



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 213

Januaro 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

MEMORINDA DATREVENO: LIDIA ZAMENHOF (1904-1942)

Antaŭ cent jaroj la 29-an de januaro 1904 naskiĝis en Varsovio Lidia Zamenhof, kies ŝatatan biografion verkis usonanino Wendy Heller jam en la jaro 1985. D-ro L.C. Zaleski- Zamenhof mencias, ke "onklino Lidia estis la plej fervora esperantistino en la familio. Ŝi estis ĉarma virino kun animo plena de amo kaj bono. Ŝia ĉeesto alportis plezuron. Eble pro tio mi rapide ekregis Esperanton." La plej juna infano de doktoro Zamenhof, Lidia estis 13-jara kiam ŝia patro mortis en 1917. Ŝi daŭrigis lian laboron kaj dediĉis sian vivon al la disvastigo de Esperanto kiel tre ege sukcesa Cseh-metoda instruistino, precipe en Francio kaj Usono, antaŭ ol ŝi spertis tristan finon de sia vivo en la mortigejo Treblinka en 1942.

La 9-a Universala Kongreso estis aranĝita en 1913 en la urbo Bern, Svislando. Tiutempe Lidia, kies karesnomo en la familio laŭ la pola maniero estis Lilka, havis la aĝon de naŭ jaroj. La patrino Klara skribis pri siaj problemetoj al la filino Zofia. Knabineto Lilka ne scipovis Esperanton nek emis studi ĝin. Ŝia ĉeesto en Bern ne povus esti ebla sen elementa parolkapablo de la Internacia Lingvo. Miraklo okazis. Post ses semajna intensiva studado Lidia lernis tiom, ke la patrino promesis al la eta filino eblecon vojaĝi kun la gepatroj somere 1913 al Svislando, kie la filo Adamo kaj la filino Zofia ambaŭ studis medicinon.

En la juda kvartalo Muranow situas la konata malliberejo Pawiak, kie la onkloj de la nepo, Lidia kaj Zofia, pasigis sep monatojn. Dum la restado ne estis prezentitaj iuj akuzoj, eĉ oni ne pridemandis ilin. Hodiaŭ en la loko funkcias muzeo. La varsovia juda kvartalo estis, post Novjorko, la plej granda juda urbo en la mondo kun entute tricent mil judoj. Komence vivis sur la tereno de iom pli ol tri kvadrataj kilometroj 350 mil homoj; poste estis alkondukitaj el aliaj landoj pliaj 150 mil. Tre konata estis kaj ankoraŭ estas la enirejo al la transŝarĝa placo (germane 'Umschlagplatz'), kien kondukis la stratoj Dzika kaj Zamenhofa. La

tuta areo estis severe kontrolata de la gardkordono. Kompreneble nenio restis tie post la ruinigo de la varsovia getto dum la dua mondmilito, sed tamen indas pilgrimi kun pensoj memore al Lidia Zamenhof sur tiu ĉi distrikto kaj la laŭnome konataj stratoj.

Multflanka estis la traduklaboro de Lidia Zamenhof. Ŝi montriĝis bonega konanto kaj ŝatanto de la pola literaturo, kaj jam kiel junulino pretigis iujn tradukojn el la pola. Sed tute aparte famiĝis ŝia traduko de *Quo vadis*, pri kiu recenzo en Literatura Mondo (1934) menciis jene: „...la traduko estas glata, facilflua, bonege ekvilibra, kristale klara.” Kompreneble tekstoj koncerne Bahaan Kredon okupas gravan lokon en la krea verkado de la filino de Ludoviko Zamenhof.

En 1930 Lidia Zamenhof vojaĝis al Haifa en Palestino, sankta loko por bahaanoj, kaj renkontis Shoghi Effendi, la tiaman gvidanton de la Bahaa Kredo. La mesaĝo de Lidia Zamenhof estis la unueco de la homaro, la interfratiĝo de homoj, la emancipiĝo de la virinoj kaj batalo por paca mondo. Ĉio ĉi en la homaranismo proklamita de ŝia patro kaj en la instruoj de la Bahaa Kredo. Konata hungaro K. Kalocsay poeziumis 1931 ĉi tiel:

„Lidia Zamenhof, kor' fervora
Vartante patran sent-heredon,
Jen serĉas sorĉan sav-rimedon
Por mond' amara kaj dolora. ---”

„El sent' profunda, pens' valora
En sino havas riĉan bedon.
El ili plektas florbukedon:
Novelojn kun enhav' trezora,
Lidia Zamenhof, kor' fervora.”

— Jorma Ahomäki <jorma.ahomaki@luukku.com>

KIM HENRIKSEN: „Esperantujo estas ĉi tie”

Lia nomo: Kim. Lia familia nomo: Henriksen. Lia devenlando: Danujo. Lia naskiĝtago: "198... ne... 1960", tuj korektis tiu ŝercema denaska esperantisto kaj fame konata muzikisto kiu jam de 38 jaroj regas nin per sia bunta, originala kaj altkvalita muziko.

- Kiam vi ekkomencis kanti?
- Mi komencis kanti kiam mi estis 5-jaraĝa. Mi kantis dum Esperantorenkontiĝoj kune kun la aliaj infanoj.

Plurajn jarojn poste, en 1982, kune kun Bertilo WENNERGEN kaj Micke ENGLUND li fondis Amplifiki-n, rokgrupon kiu, ĝis 1998, dato de la eliĝo de siaj membroj, fariĝis unu el la plej popularaj Esperanto-grupoj. Sed, same kiel fenikso renaskiĝas el siaj cindroj, unu jaron poste, en 1999, aperis „Esperanto Desperado”,

dana-pola-bosna grupo kiu ne nur okupiĝas pri rokmuziko sed ankaŭ pri mondmuziko. Ĝi estas 5-ana grupo kiu jam partoprenis multajn gravajn Esperanto-aranĝojn en pluraj landoj.

Kim kaj lia grupo ne nur muzikas por la Esperanta publiko. Ili atingas ekstermovadanajn muzikŝatantojn kiuj pozitive reagas al ilia muziko, li fiere aldonas. La KD de Esperanto Desperado, „Jen venas... brokantaĵoj”, aĉeteblas en diversaj muzikvendejoj ankaŭ en Danujo.

Sed fakte, pri kio okupiĝas Kim kiam li ne koncertumas alilande? Pri muziko, kompreneble! Kim estas profesia ritmikpedagogo; tio estas, li instruas pere de muziko kaj li laboras en pluraj infankulturdomoj kaj lernejoj en sia lando. Liaj gelernantoj aĝas inter 3 kaj 80 jarojn.

- Muziko estas grava parto de ĉiu ajn kulturo. Kion vi opinias pri la nuna E-muziko?
- Laŭ mi, estus bone, se ĝi estus pli profesia. Se ĝi estus pli profesia, la Esperanta kulturo plialtiĝus.
- Kaj kion vi pensas pri Esperanto? Ĉu ni iam venkos?
- Ni jam venkis. Oni povas vojaĝi tra la tuta mondo kaj ĉeesti bonegajn aranĝojn.
- Kio, laŭ vi, estas la plej grava problemo ene de la E-movado?
- Esperantistoj ne bone aŭskultas. Multaj lernas la lingvon nur por paroli kaj ne por aŭskulti.
- Kaj kio estas la plej grava afero en via vivo?
- Mia filo Villads, li senhezite respondiĝis. Mi jam verkis por li kaj li eĉ enkondukas „Jen venas... brokantaĵoj”.
- Kaj finfine Kim, laŭ vi, kie estas Esperantujo?
- Al tiu malfacila demando, li tuje kaj simple respondiĝis: ĉi tie.

Kaj jes, li pravas, dominikano kaj dano, kiuj ĉeestas usonan E-aranĝon kune kun trideko da esperantistoj el 9 malsamaj landoj... Kie alie povas esti la lando de niaj sonĝoj?

— Rafael DESPRADEL, Dominika Respubliko

el La NASKa Fasko (Volumo 15-Número 11, Brattleboro, Vermonto, 2003 Julio 21),
redaktis Tim WESTOVER

„Jen venas... brokantaĵoj”, de Esperanto Desperado, aĉeteblas pere de pluraj libroservoj, kaj ankaŭ troviĝas inter la „Plej Bonaj Vendaĵoj” de VINILKOSMO kiel disko n-ro VKKD34. „Poproko, blusroko, roko, skao, regeo, mondmuziko: jen muzikoj kiujn vi malkovros en la unua KD de la nova bando el Kopenhago en Danio. La kantistoj Kim (eks-amplifikiano) kaj Amir el Bosnio donas al tiu ĉi albumo sudorientecajn kolorojn ... Sentebblas ankaŭ la influoj kaj nostalgio de Amplifiki kun titoloj kiaj ‚Sola’. Nepra disko por danciga etoso!” Produktita de Vinilkosmo © 2000.

RAPIDE PARTOPRENU LA MUZIKAN KONKURSON DE RADIO POLONIA EN ESPERANTO! (valida nur ĝis la 15-a de februaro 2004)

Esperanto-Redakcio de Pola Radio kune kun **VINILKOSMO** lanĉis komunan konkurson, kies celo estas atentigi pri la graveco de la muzika kulturo en la Esperanto-komunumo. En la lastaj jaroj ĝi signife evoluis. Aperis multaj novaj bandoj, oni produktis multajn novajn KD-ojn. Apud amatoraj ekzistas trupoj profesi-nivelaj. Krom populara, distra, junulara muziko kreiĝas verkoj apartenantaj al la ĝenro de serioza muziko, komponataj pro la inspiro de la ideo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Por partopreni la konkurson ni petas respondi al almenaŭ du el inter tri demandoj:

- 1) Kiujn artistojn kaj ensemblojn vi konas, kiuj popularigas la polan muzikon pere de Esperanto?**
- 2) Menciui almenaŭ kvin KD-ojn eldonitajn de VINILKOSMO.**
- 3) Kiuj aranĝoj kaj forumoj (festivaloj, rendevuoj, periodaĵoj, TTT-paĝoj) plej gravas por popularigo de la E-muziko?**

La respondojn ni atendas ĝis la 15-a de februaro 2004. Vi povas sendi viajn respondojn per elektronika poŝto laŭ la adreso:

esperanto.redakcio@radio.com.pl

aŭ tradicia voje: Pola Radio, Esperanto Redakcio, Al. Niepodleglosci 77/85, 00-970 Varsovio, Pollando.

Inter la partoprenantoj de la konkurso ni lotumos valorajn, objektajn premiojn, interalie la laste furorantan KD-on de Vinikosmo „Elektronika Kompilo”. Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn. Multaj premioj atendas!

ESPERANTO-Redakcio de Pola Radio <<http://www.radio.com.pl/polonia/eo/>>
VINILKOSMO <<http://www.vinilkosmo.com/>>

